

PRI LA KULTURDOMO

Kio okazis en Gresillon dum la somero ? Tiun demandon faras al si la gesamideanoj, kiuj ne havis la okazon viziti la kastelon ĉijare. Ĉar ankaŭ la administrantaro faras al si tiun demandon kiel kutime en oktobro, jen la respondo.

La diversaj eroj de la programo okazis laŭ la antaŭvidita plano. La unua periodo estis dediĉita al kursoj gvidataj de S-ino Major, kiu tiel kompetente kaj vigle instruas la praktikan lingvon ; F-ino J. Vazon kaj poste D-ro Boulogne kiuj zorgis pri la komencantoj kun granda sindonemo ; S-ro Ribot, kiu gvidis la superan kurson kun la kutima sukceso. Bedaŭrinde la nombro de la kursanoj ne estis tiom granda, kiom lastan jaron.

La prelegoj prezentitaj dum la dua periodo multe plaĉis. D-ro A. Bormann, D-ro W. Bormann, S-ro Chevalier, S-ro Frangeul, S-ro J.-P. Guillot parolis pri siaj plej ŝatataj temoj : Eŭropo, lingvistiko, alergio, turismo, Scienco en la moderna vivo. La diverseco de la temoj, la kompetenteco de la prelegantoj pravigas la sukceson ricevitan de la diversaj prelegoj. La programo de la ekskursoj, iom ĝenataj de la vetero, tamen plaĉis kaj eĉ gesamideanoj, kiuj jam vidis kelkajn el la kasteloj, kies vizito estis proponita, partoprenis la ekskursojn kun granda plezuro.

La tria periodo, kvankam la nombro da ĉeestantoj ne estis tiel granda, kiel lastan jaron ĉar la Universala Kongreso ne okazis en tiom malproksima lando, venigis nombron da jam konataj gesamideanoj, kaj nekonatulojn, kiuj tuj fariĝis niaj amikoj. La grupo de gejunuloj estis simpatia kaj ĉiuj memoros pri Maria Drašnarova el Praha kies afableco kaj rideto radiis en la tuta kastelo. Oni multe laboris en Esperanto. Oni ankaŭ multe laboris posttagmeze en la laborejoj ; oni atente aŭskultis la konsilojn de S-ro Bourdelon kaj tre

bele bindis librojn ; oni faris multajn korbojn kaj aliajn tre elegantajn rotango-objektojn sub la gvidado de S-ino Benazet. Fakte oni lernis multon.

Pro malhelpo okazinta al S-ro Martin, S-ro Ribot afable kaj sindoneme konsentis gvidi la kursojn de la lasta periodo. Lia tasko ne estis tre facila ĉar la lingvo-nivelo de la kursanoj estis iom malsimila. Sed li sukcese interesis ĉiujn kaj tio estas lia granda merito.

Kaj nun ni devas jam pensi pri la venonta somero. Kelkaj novaj eroj estos verŝajne enkondukitaj en la programon. Eble okazos seminario organizita de grava internacia fako. Sed pri tio ni parolos pli poste. La ĝenerala programo estos verŝajne preta en novembro. Tiam vi povos peti informojn.

NIA RESTADO EN GRESILLON

Estas la dua fojo, ke Lisbeta kaj mi venas en Grésillon. Grésillon estas tiel bela kiel la alian jaron. La kastelo, la lago, la ĝardeno kaj la parko estas tre agrablaj por ni. Kiom da plezuroj estas en Grésillon ! Oni povas fari multon. Tiu restado estas ankoraŭ pli interesa ol tiu de 1965, kial ? ĉar la vetero estas pli bela, oni povas sekvi la kurson de sinjoro Ribot kaj sin bani. En Grésillon oni ankaŭ tre bone manĝas. Nun ni devas multe danki sinjorinon Vincent pro ŝia granda afableco kun ni.

Ankoraŭ multajn dankojn kaj

Vivu Grésillon !

SCHREIBER Lisbeta, 10-jara knabino.

PANNIER Véronika, 11-jara knabino.